

Heinrich Neye,
Fariĝo kaj esto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Tiam, kiam ni naskiĝis,
estis de l' sekuro fin',
kiam ni ekmalvarmiĝis,
kio kriegigis nin.

Ni volonte ja memorus
pri la tago de l' ekkri',
se ĉi tiu no tro forus,
ne tro aĝaj estus ni.

Venas amikaro nia,
ankaŭ tuta parenkar',
ni invitas ĉiujn, tia
komenciĝas la viv-jar'.

Malpli laŭtaj poste iĝas
Niaj festoj, ankaŭ la
Amikaro pli saĝiĝas,
ili pliaĝiĝis ja.

Por konatoj niaj iĝas
Multaj aĵoj jam tabu',
malrapide konsciiĝas
ni, ke l' tempo fluas plu.

Restas sen dolor' neniu,
sed validas la regul:
pliaĝiĝi volas ĉiu,
sed ne esti pliaĝul'.

*Traduko de la Germana poemo "Werden und Sein" de HEINRICH NEYE (*1913-02-27 – †2002-07-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2007-05.*

MR- / Arg-416-824 (2007-05-20 22:19:04)

La origina germanalingva versio de tiu ĉi poemo aperis en 2007-04-26, en la n-ro 17/2007 de la germana agronomia revuo "Landwirtschaftliches Wochenblatt" (Postfach 4929, D-48028 Münster, Germanio, tel. +49-(0)251-51012-24 aŭ +49-(0)251-51012-35, ret-adreso: redaktion@wochenblatt.com, retejo: www.wochenblatt.com). La eldonejo de la revuo kaj s-ino Erika Neye[Max-Zelde-Str. 2, D-22459 Hamburg, Tel. (040) 850 79 7], la vidvino de la aŭtoro, donis al mi en Aŭgusto 2005 la permeson de traduko kaj publikigo de la poemoj de Heinrich Neye.]